**Skizo pri la anarkista movado en Rusio dum la Revolucio (1917—1923)**

Malgrandaj pri la cara regimo, subplankaj anarkistaj grupetoj reviviĝas en 1917 k. profitante la relativan politikan liberon propagandon. Aperas la unuaj k en la tuta lando formiĝas grupoj.

La anarkistaro provas eliri el kaosa organizostato k: la 12—17 junion okazas en Ĥarkovo la unua anarkista konferenco[1]. Ĉi-konferenco organizis *Provizoran Informejon de l'Anarkistoj,* kies tasko estis aranĝis tutlandan anarkistan kongreson por kiu celo la informejo estis eldoninta specialan bultenon. Bedaurinde pro diversaj cirkonstancoj la intencita kongreso neniam okazis.

La anarkista movado kreskis tiel rapide, ke dum la oktobra revolucio, la anarkistaro prezentis jam grandan forton, k. oni prave povas aserti, ke la anarkistaro forte helpis forigi la *Provizoran Registaron k.* al komunistoj enkonduki *proletarian diktatorecon.* Granda estis la influo de la anarkistaro ĉe la laboristaro. Jen kio skribis la menŝevika gazeto *La nova Vivo* (Novaja Ĵizn) en la artikolo *L'Anarkismo k. la Revolucio:* (novembro 1917) «Nerimarkablaj k. nulaj laŭ sia influo dum la unuaj tagoj de la revolucio, nun la anarkistoj estas forto ĉu hodie[2] ĉu morge konfesenda, k. kies signifo por la plua evoluo oni ne maltroigu", k. plue: "Okazis, ke dum la rusaj socialistoj kun persisto inda je pli bona uzado okupadis sin per reciproka fivizaĝinterfrapado (oni pardonu al ni la brutecon de l'esprimo) inter la laboristaro kreskis k. larĝiĝis  l'influo de l'anarkistoj". Prava la gazeto estis.

La aktiveco de la anarkistoj estis imitinda. Jen ekzemple unu fakto el la vivo de l'anarkistaj grupoj. Malgranda grupeto Pano k. Libero (Ĥleb i Volja) en Bejica, Orela Gubernio, abonis ĉiumonate: 700 ekz. de *L'Anarkisto*, 200 ekz. de *Pano k. libero*, 300 ekz. de *Laborista Penso*, 300 ekz. de *Voĉo de l'Laboro,* 500 ekz. de *Libero en ni interne*, 300 ekz. de *L'Anarkio*, k. ĝi aĉetadis proksimume 500-600 librojn k. broŝurojn ĉiumonate.

Dum 1917 eliris la sekvantaj ĵurnaloj k. gazetoj:  *Anarkisto* (en Rostov s/Don), *Anarkio* (en Moskvo), *Senestreco* (en Petrograd), *Ribelulo* (en Tomsk), *Albatroso* (en Petrograd), *Albatroso* (en Odesa), *Bulteno de Provizora Informejo* (en Ĥarkovo) ekkredintaj la tujan venon de l'socialismo; ja, la kuna agado estas ĉiam forta esperilo. Sed bedaurinde balde okazis disiĝo,  malpaco. La Registaro eĉ arestigis anarkistojn; kluboj estis fermataj, jurnaloj malpermesataj. La preteksto estis, ke multaj banditoj troviĝis en la vicoj de l'anarkistoj. Fakto certe vera, sed tute neevitebla k. okazinta anke en la vicoj de 1'bolŝevikoj.

Persone mi opinias, ke la vera motivo estis forta ŝtatemo ĉe niaj anteaj amikoj.

Nevolante pliakrigi la kauzojn de la malpaco inter anarkistoj k. bolŝevikoj mi daŭrigu mian skizon.

---

[1] *Анархисты Документы и материалы 1883–1935 гг.* Том 2, Москва, РОССПЭН, [Dokumentoj k materialoj 1883-1935, tomo 2, Moskvo, Rosspen (Rossiiskaja Politiĉekaja Enciklopedia, Rusa Politika Enciklopedio)], 1999, №296. Noto de la skananto.

[2] En ĉi-artikolo la aŭtoro forigis la vortfinaĵon «aŭ» k. Anstataŭis  ĝin per «e». Konforme je nia starpunkto tolerema ni allasis tiun formon, kiu ne malebligas kompreni la sencon de la teksto. Plie oni sciigis nin, ke tiu e-formo estis antaŭmilite permesata de l'Akademio. Ĉu vere? Ni ne posedas dokumentoj por kontroli.
Eble la legantoj deziros ekscii la opinion de la Redakcio pri tio ŝanĝeto. Nu, jen: La vortfinajo «aŭ» ŝajnas konservinda, tial ke ĝi aldonas variecon al la sonaro de nia lingvo. La tro oftaj sonoj a, o, e farus monotona la aŭdadon de esp.o.
Estis en tiu artikolo aliaj novaĵoj, kiujn ni forstrekis, tial ke ili riskus  konfuzi tro grandan kvanton da niaj legantoj. Red.

Malgre la persekutadoj dum la jaro 1918 ni vidas elirintaj gazetoj k. ĵurnaloj: *Pensoj k. Paroloj*, *Anarkisto* (en Moskvo), *Anarkisto* (en Jaroslavo), *Anarkisto* (en Arĥangelsko), *Astraĥana Anarkisto* (en Astraĥan), *Anarkio* (ĉiutaga en Moskvo), *Senaŭtoritateco* (en Ĥarkovo), *Albatroso* (en Petrograd), *Bulteno de Ekzekutivejo* de Leforta (?) organizaĵo (en Moskvo), *Kuriero de l'Anarkio* (en Brjansko), La Ondo (en Ekaterinburg), Libera voĉo de l'Laboro (en Moskvo), Libera Laboro (en Petrograd), *Vjatka Libera Komunumo* (en Vjatka), *Voĉo de l'Anarkio* (en Saratovo), *Voĉo de l'anarkisto* (en Ekaterinoslavo), *Voĉo de l'laboro* (ĉiutaga en Petrograd k. Moskvo), *Venonto* (en Vologda), *La Standardo de l'Anarkio* (en Kursko), *Vojo al Anarkio* (en Saransko), *Revolucia Kreado* (en Moskvo), *Laborista Standardo* (en Petrograd), *Laborista Penso* (en Moskvo), *Libera Komunumo* (ĉiutaga en Moskvo), *Libera Penso* (en Voroneĵo), *Voĉo de l'Anarkisto* (en Smolensk), *Nabat* (en Kursk), *Sub nigra standardo* (en Nijny Novgorod), *Penso de la plej liberaj homoj* (en Astraĥan), *Apud kama Anarkio* (en Vjatka), Nigra Standardo (en Moskvo), *Nigra Standardo* (en Samara), *Nigra Standardo* (en Petrograd), Ukrainlingva *Burevjstrak* (en Ĥarkovo), Latvolingvaj *Britila Komuna* (en Ĥarkovo) k. *Leesma* (en Moskvo), k. Tatarlingva *Belem* (Scio en Kazan). Ekzistis multaj eldonejoj eldonintaj grandan kvanton da libroj k. broŝuroj. Pli ol 30 nekonataj al la okcidenta k.daro libroj estis eldonataj de la eldonejoj *Voĉo de l'Laboro*, *Libera Frataĵo*, ktp.[3].

La anarkistaj grupoj penas daŭrigi la laboron, sed la k.daro elmigras el Rusio Ukrainon k. iom post iom la anarkista movado en Rusio (la Nuna R.S.F.S.R.) malpligrandiĝas k. plu ne reviviĝas tiel aktive kiel antee. En Ukrainio oni batalas kontre la blankuloj k. tie la konstanta danĝero denove ligas la ambe frakciojn de l'socialismo. La anarkistoj denove batalas amike kun komunistoj esperante, ke ĉi-lastaj komprenos la eraron okazintan. Sed ree okazis la samo kiel en Rusio: La anarkista movado kreskis rapide, grandamplekse k. estas anke sufokita pro severaj persekutadoj.

En Ukrainio, en la anarkista movado monopole agas la t.n. Nabat-organizaĵo. Kvankam miaopinie l'Unueca Anarkismo (teoria bazo de ĉi-organizaĵo) estas erara, necesas konfesi, ke ĝia agado estis tre vigla k. influhava. La movado Nabat naskiĝis en Kursk, kie en la mezo de novembro okazis la unua konferenco de l'anarkistaj organizaĵoj de Ukrainio[4]. Dum ĉi-konferenco estis akceptata Deklaracio pri kunagado sur la bazoj de l'Unueca Anarkismo. L'Unueca Anarkismo konsideras anarko-individualismon, anarko-komunismon k. anarko-sindikatismon nur diversaj flankoj de l'Unueca Anarkismo (aŭ de l'Integra[5] Anarkismo kiel diris kelkiuj), kies taktika metodo estas sindikatismo; la doktrino pri ekonomia bazo de l'estonta socio estas libera komunismo k. la doktrino pri ĝia celo estas anarko-individualismo.

La konferenco estas kreinta *konfederacio de anarkistaj organizaĵoj el Ukrainio*. La ĵurnalo *Nabat*, ĝis tiam organo de l'iniciatora grupo, fariĝis organo de la konfederaĵo. En aprilo 1919 okazis la unua kongreso de l'konfederaĵo. Estis intencata tutruslanda kongreso de Nabat-organizaĵoj, sed sensukcese.

---

[3] Noto: inter la nekonata al la okcidenta k.daro libroj estas precipe notindaj la jenaj; 1° *Anarkismo*, 2° *Individuo kaj la Socio en Anarkista Mondconcepto* de Borovoy, 3° *La Etiko* de Kropotkin (ĉiuj ili estas preparata por la Eldonejo da *Intern Scienca Anarkista Biblioteko esperantlingva*), 4° *P. Kropotkin* (artikolaro pri la fama teoriulo) k. 5° *A la Memoro de P. Kropotkin* (eldonita de *Komitato por eternigi la memoron de Kropotkin*). Ĉi-libroj estis eldonataj (krom la unua iom poste) en 1921 k. 1922. [Noto de la aŭtoro]

[4] Ne aperis en *Анархисты Документы*. Tamen la protokolo en ruse estis eldonita en 1922 en Buenos Aires, vidu en ruse http://www.fondation-besnard.org/spip.php?article379; en France http://www.fondation-besnard.org/spip.php?article380; k hispane http://www.fondation-besnard.org/spip.php?article381 Noto de la skananto.

[5] Integra = Tute kompleta. Red.

La organizaĵo sukcesis aperigi dum kelkaj monatoj 23 numerojn de la Konfederacio *Nabat,* 7 n.rojn de L'Guljaj Pole-a *Nabat*, 6 n.rojn de Elisavetgrada *Nabat,* 11 n.rojn de Ĥarkova *Nabat,* 7 n.rojn de Odessa *Nabat,* k. ĝi estis eldoninta serion da broŝuroj k. libroj.

Multaj k.doj estis entuziasmiĝintaj de la Maĥno-movado k. aktive partoprenis ĝin, propagandante inter la Maĥnoaj Ribeluloj la anarkismajn ideojn. La Maĥno-movado forte malutilis al la anarkista movado entute ĉar ĝi estis fortirinta multajn k.doj de urbaj organizaĵoj, pro tio tre malfortiĝintaj, k. ĝi estis erariginta grandan kvanton da k.doj per ĝiaj anarkismaj devizoj. Necesas diri ke la Maĥnoa[6] movado ne estis bandita kiel tion asertas ĝiaj malamikoj, sed simple erara ĉar ĝi estis specife vilaĝa. Al tiu entuziasmigo forte helpis la reginta persekutado. Dum somero 1919 estis disigitaj k. arestitaj du anarkistaj kongresoj (sindikatista k. gejunulara). Abomenega konfuzo regas ĉe la du frakcioj de l'socialismo k. ĉi-konfuzo rezultas mortpafadojn de l'anarkistoj k. la konata eksplodo en la ejo de Moskva komitato de Komunista Partio, kie per la bombo ĵetita de subplankaj anarkistoj estas mortigitaj kelkiom da komunistoj. Ĉi-atenco kontre Moskva komitato estas laŭ mia opinio tute malaprobinda fakto, sed anke malaprobinda estas la sensenca persekutado kontre la anarkistaro. La atenculoj opiniis igi la registaron ĉcsi la persekutadon, sed male ili estis fosinta novan abismon inter komunistoj  k. anarkistoj; alio ja en povis rezulti el tia sensenca bomb-ĵetado.

En 1919 ni vidas aperantajn ĵurnalojn preske ekskluzive en Ukrainio k. dum 1920 la nombro da ĵurnularo anarkista estas preske nula. Jen iliaj titoloj: por 1919 jaro *Anarkio* (loko nekonata, subplanka), *Bulteno por la aranĝo de anarkista kongreso* (en Ĥarkov), *Ribelulo* (en Ivanovo-Voznesensk), *Albatroso* (en Berdjansk), *Libera Berdjansk* (en sama loko), *Libera Vivo* (en Moskvo), *Libera Laboro* (en Petrograd), *Voĉo de l'Laboro* (en Moskvo), *Voĉo de l' Laboro* (en Klinci), *Guljaj Pole-a Nabat* (en Guljaj Pole), *La Vivo k. la kreo de l'rusa gejunularo (*en Mosko), *Ekaterinoslava Nabat* (en Ekaterinoslav), *Al Lumo* (en Ĥarkov), *Libero* (en Kiev), *Moskva Nabat* (en Moskvo), *Nabat* (en Ĥarkov), N*abat* (en Elisavetgrad), *Subplanka komunumulo* (loko nekonata), *Poĉin* (en Moskvo), *Ĥarkovo Nabat* (en Ĥarkov), *Laboro k. Libero* (en Moskvo), *Vojo al libero* (ruslingva k. la sama ĵurnalo ukrain-lingva, ĉe la Maĥnoanoj). En 1920: *Altaja Nabat* (loko nekonata), *Bulteno de l'Anarkista Unio same Poĉin* (en Moskvo *Voĉo de Maĥnoano* (malkaŝa ĉe la Maĥnoanoj), *Libera Ribelulo* (ĉe Maĥnoanoj), *Vojo al libero* (malkaŝa ĉe la Maĥnoanoj), *Nabat* (en Ĥarkovo), *Vojo al Anarkio* (en Blagovescenksk), k. *Nigra Standardo* (en Vladivostok) la du lastaj ne en Sovetio. Necesas diri, ke la anarkistaro tute ne deziras batali kontre komunistoj (krom kelkaj ardkapuloj tute seninfluaj). Du faktoj montros al la legantaro la pravecon de mia aserto. Dum la fiatako de generalo Judeniĉ (atako kontre Petrograd en 1919), la petrogradaj anarkistoj estis organizintaj specialan tacmenton el anarkistoj por la defendo de la urbo, k. je aŭtuno de 1920 tio, dank'al anarkista organizaĵo *Nabat*, okazis interpaciĝo inter soveta registaro k. Maĥno. Ĉi-interpaciĝo rezultis forpelon de Vrangel el Ukrainio k. Krimeo. Bedaŭrinde, poste denove komenciĝis malpaca lukto tute malaprobinda. Kiu estas kulpa en ĉi denova malpaco mi ne volas k. ne povas juĝi, ĉar materialon mi pri tio ne havas. Mi parolas nur pri faktoj kontreeblaj.

(Daŭrigota) A. Levandovskij (1325)

*Sennacieca Revuo* n° 9 (50) Junio 1924, pp. 9-10.

---

[6] Laŭ informoj publikigitaj antaŭnelonge, okaze de la juĝo de Maĥno en Polio, ŝajnas, ke tiu famulo estis nur agento de la pola registaro. Red. [Tute erara rimarko. Nota de la skananto]

**Skizo pri la anarkista movado en Rusio dum la Revolucio (1917—1923)**
(Daŭrigo)

Esperante, ke la kontrakto farita inter la Soveta registaro k. Maĥno estos lojale plenumita de la komunistaro (en ĉi-Kontrakto estis dirite pri plenlibera propagando de l'anarkismaj ideoĵ), la Ukraina konfederacio el anarkistaj organizaĵoj *Nabat* estis komencinta aranĝi la delonge intencatan tutruslandan (tutsovetan) kongreson. La 1. dec. ĝi devis okazi malkaŝe en Ĥarkov. Sed la venintaj delegitoj estis grandamase arestataj, la kongreso ne okazis k. la movado en Ukrainio estis sufokita. La plej aktivaj k.doj (kiel ekz. Volin. Baron, Mraĉny, Olga Taratuta k. aliaj) estis maliberigitaj. Volin, Mraĉny, Maksimov, Farĉuk k. kelkaj aliaj k.doj sukcesis iri eksterlanden. Dum la periodo 1917—1920 nur en Moskvo estis arestitaj 432 malkaŝaj k. 211 subplankaj anarkistoj (vidi la libron *Ruĝa Libro*, paĝo 632, eldono de Moskva Soveto). Dum 1921—1922 k. 1923 regas silento. Iom montras signon de vivo la t.n. Sovetismaj anarkistoj, sed nur dum mallonga tempo. Aperas tute ne regule du ĵurnaletoj *Poĉin* k. *Volnaja Jizn*, kaj laboras la sola restinta anarkista eldonejo *Golos Truda*. *Poĉin* (la Iniciato) komencas la 20. februaron eliri jam kiel dusemajna gazeto sed la 3a numero estas konfiskita k. la gazeto palpermesita, kvankam ĝin partoprenas G. Sandomirsky, okupanta grandan postenon en *Narkomindel* (Popola Komisarejo por Eksterlandaj aferoj) kie li estras la Balkanan fakon[7].

Nun mi opinias necese, skizi iom pri la tendencoj k. fluoj. Kîel en ĉiuj landoj en Rusio ekzistis anarko-sindikatistoj, anarko-komunistoj k. Anarko- individualistoj. Sed krom ili ekzistis anke tute nekonataj de okcidenta kamaradaro fluoj konsiderataj de kelkiuj kiel tute malindaj por esti nomataj anarkistaj; ĉar mi estas nur raportanto, sed ne juĝanto, mi raportas pri ili anke. La unua laŭ la tempo staras la t.n. *Pananarkismo;* kies teoriuloj estas fratoj Gordin, organizintaj Centran Socioteknikejon k. speciale kontraktintaj kun Soveta Registaro pri t.n. eksterteritorieco de ĉiuj socioteknikejaj institucioj. Ĉi tendenco akre propagandis kontre la religio k. la teoria scienco, kiun ĝi vokis anstati per la *Panteknikismo*. (La k.doj posedantaj rusan lingvon legu iliajn ĉefverkojn: *Manifesto de Pananarkistoj*; *Marksismo k. Kristianismo* k. *Konversacio kun anarkistafilozofo*. Iom poste ili ambe estis forlasintaj ĉi tendencon (kun ilia forlaso mortinta) k. unu el ĉi du tre instruitaj fratoj fariĝis eĉ anti-anarkiano k. kreinto de nova tute sensenca teorio k. lingvo AO. La alia (A. Gordin) estis partopreninta la novaperintan tendencon. La *Anarko-Universalismo*; fluon, kies teoriaj principoj estas laŭ mia opinio sufiĉe nebulaj. Pri l'Anarko-Universalismo oni povas legi la ruslingvan broŝuron de Askarov, *Fundamentaj demandoj de anarko-universalismo.* La tutrusia sekcio de anarko-universalismo aperigis 4 n.ojn (1-2 k. 3-4) de sia ĵurnalo *Universalo*. Gordin eksiĝis anke el tiu organizaĵo k. estis fondinta novan grupon kun novaj teoriaj bazoj, kelkaloke tre interesaj (ekz. doktrino pri tipoj-gvidantoj k. gvidatoj, ktp.) sed esprimitaj en tute nedigestebla lingvo. (La ĉefverkoj estas: *De jura anarkismo al fakta* kaj *Anarko-universalismo-interindividualismo.)*

La nova fluo estas nomata *anarko-universalismo-interindividualismo* k. havis ampleksan ĵurnalon *Per socialismo al Anarko-Universalismo -Interindividualismo*. (Mi vidis nur 5 n.rojn). Ambe tendencoj propagandis sovetismon k. la dua eĉ forte laŭdadis Komintern, sed tio ne malhelpis al iliaj reprezentantoj esti arestataj. Oni nomadis ĉi tendencojn sovetismaj.

---

[7] Sandomirsky aperis en Italio por fari propagandon acertante, ke la anarkistaro libere agis en Sovetio. Eriko Malatesta skiribis kritikajn artikolojn (4 de majo1922, 15 de marto 1924) kontraŭ la mensogoj de la eksrusa anarkisto. (Noto de la skananto).

Mi iom dira pri t.n. Sovetisma anarkismo. (Ĝi formiĝis el k.doj opiniintaj, ke la bolŝevikoj faras poranarkisman aferon k. tial la anarkistaro devas aktive partopreni ĉiujn sovetajn instituciojn. Juda Rosĉin estas la plej fervora ĝia reprezentanto. Li estis dirinta, ke pro la civitana milito nun en Rusio regas militistara spiritstato, kiu poste estas nepre anstatota de produktemeca spiritstato k. tiam. sed nur tiam ebliĝos la libera komunismo. Ĉu ili pravas mi ne scias, sed sukceson ili ne havis. Mi nur konstatas, ke ili eĉ organon specialan ne havis por propagandi sian tendencon. Multaj el ili simple eniris komunistan partion. Nur la tiel nomata *Tutrusia Federacio de anarkistoj-komunistoj* posedis dum 1918 sufiĉe bonan organon, iam havis influon en Tutruslanda Ekzekutiva Komitato de Sovetoj en kiu ĝi havis siajn reprezentantojn (Karelin k. Ge). En la IV. Kongreso de Sovetoj eĉ estis 29 delegitoj membroj de la suprenomita organizaĵo. Sed iom blufa ĝi estas (kion pruvas ĝia nomo, car kiamaniere konsideri organizaĵon sin nomantan Tutrusia k. preske krom en Moskvo eĉ grupetojn ne havanta). Nun ĝi tute silentas kaj ne plu propagandas sovetismon.

Nun kelkiom da vortoj pri sindikatista movado de la anarkistaro. En la profunuiĝoj[8] laboris precipe anarko-sindikatistoj kaj anarko-komunistoj. Granda ne estis la influo de la anarkistaro ĉe la proforganizaĵoj. Tamen en 1918 la nacian kongreson de sindikatoj partoprenis 25 anarkistoj, reprezentantaj 88000 laboristojn. En 1919, 15 delegitoj reprezentis 53000 laboristojn, k. en 1920, 10 delegitoj reprezentis 35000. Pri pli posta agado mi ne posedas skriban materialon.

La gejunularo anarkista havis la saman sorton kiel la tuta anarkistaro. En 1918 jaro ĝi eldonis kelkdekojn da numeroj de sia ĵurnalo *La vivo k. la kreo de la rusa gejunularo*[9]. La 29. Junion okazis la unua kongreso de *Tutrusia federacio de anarkista gejunularo,* sed post kelktaga laboro (la 1. Julio) ĝi estis disigata k. arestata. Restinta okaze libera k.do Korsikov penis restarigi la organizaĵon sed sensukcese. Fakto tre bedaŭrinda ĉar la gejunularo estis tre aktiva k. revoluciema. Multnombraj estis ĝiaj membroj mortfalintaj en la lukto kontre la blankularo (ekz. en Elisavedgrad nur en la batalo kontre Grigorjev mortfalis 6 junaj k.doj anarkistoj el kiuj 2 la plej aktivaj: Janus Baltin k. Miŝa Zloj Radomislskij, ĉi lasta estis frato de l'prezidanto de Komintern, Zinoviev-Radomislskij).

Finante mian skizon mi volas diri kelkiom da vortoj pri la tiel nomata Maĥno-movado. La plejparto de okcidentaj k.doj anarkistoj konsideras ĝin anarkista, dum aliuj k. la komunistoj male konsideras ĝin bandita. La ambe asertoj estas malpravaj. Ĝi estis nek anarkista nek bandita. Al ĝia amikaro mi nur dira, ke en ĉi-movado ekzistis same kiel ĉe bolŝevikoj la t.n. *Ĉeka,* oni mortpafadis k. mobilizis, regis diktatoreco de Maĥno k. lia stabo, k. la libero ekzistis nur en la limoj de la Maĥno-movado t.e. ĝis oni ne propagandis kontre ĝi. Ĝia adoranta k.daro dira kion ĝi volas, sed neniam estas forstrekota el Maĥno-movado: 1° la mortpafado de la komunista komandanto Polonsky (estrinta ĉe Maĥno iun regimenton) kun liaj k.doj; 2° ke en Berdjanse ekzistis la t.n. *Kontraazvedka,*[10] aginte tute same kiel la *Ĉeka,* kaj 3° ke en Guljaj Pole ekzistis institucio, kies nomo estis *Ĉrezviĉajnaja Komisija po borbe s kontr-revolucijej i protivo-Mahnovsciny* (eksterordinara komisiono por la lukto kontre la kontrerevolucio k. la kontremaĥno-movado) t.e. Ĉeka.

Vere estas, ke en la Maĥno-movado ekzistis forta fluo de anarkistoj, sed nur fluo k. ne pli. Estas do tute stulte nomi la tutan movadon pro tio anarkista. Ĉu iu nomus la rusan revolucion anarkista pro forta anarkista fluo dum oktobraj tagoj: Certe ne. Mi opinias, ke nepre estus okazinta konflikto inter Maĥno k. la anarkistaro. Simptomoj jam ekzistis fortaj (oni legu pri tio rezolucion pri Maĥno-movado de anarkista konferenco en Aŭgusto 1920, ĉi

---

8 Mallongigo de profesiaj unuiĝoj. *(Red.)*

9 Niaj k.doj Nekrasov k. Rozenblat vigle propagandis en ĉi ĵurnalo esperanton. (Noto por S.-A.-T. anoj)

10 «Kontra[r]azvedka»: ruse kontraŭspionado. (Nota de la skananto).

rezolucio estas tre instruiga[11]). La estonta historiulo de la Maĥno-movado (ne ĝia oficiala historiulo k.do Arŝinov mem fervora Maĥnoano, sed aliu, tute objektiva) certe rakontos al ni pri akraj bataloj okazintaj inter Maĥno k. kelkiuj konataj k.doj ne dezirintaj toleri la diktatorecon de Maĥno k. lia stabo same kiel ilian neanarkistan agadmanieron. Al malamikoj de ĉi-movado mi diru, ke same kiel neniam estas forstrekenda ĝiaj mankoj same neniam povas esti forstrekota la lukto de Maĥno kontre Germana okupacio, Denikin, Petlura k; Vrangel. Oni neniam sukcesos forstreki tiun fakton, ke la maĥnoaj taĉmentoj estis helpintaj liberigi la Tutan Ukrainion k. Krimeon k. ke la komunista gazetaro estis iutempe plena per laŭdantaj Maĥnon artikoloj. Sincerulo objektive juĝanta devas simple diri ke okazis granda miskompreniĝo inter du partoj de Iaboranta klaso, miskompreniĝo bedaŭrinda sed nur miskompeniĝo k. nenio pli; kiu pravas? respondos la historio. Nun oni povas nur bedaŭri k. peni, ke tio ne plu okazu.

Mi skizis iom pri anarkista movado en Rusio. Ĉu bona estis la movado? La k.daro juĝu mem. Persone mi pri ĝi opinias jenon: aktiva k. vigla ĝi estis, esperoplena, sed maltrafa. Grandajn barojn ĝi havis en sia laboro, sed necesas diri, ke forte kulpas la anarkistaro mem. La anarkistaro tute ne komprenis sian historian rolon k. anstate streĉi siajn fortojn al starigo en Rusio de solidaj bazoj por la evoluo de anarkismaj ideoj, al pli forta ilia enprofundigo en la laborista maso, la anarkistaro estis kreinta al si iluzion pri tuja eblo de anarkista revolucio en lando kie ĝis 1917 oni pri anarkismo preske nenion sciis k. ofte ne povis distingi anarkistojn de banditoj. Oni tute ignoris la fakton ke la popolo ankore ne estas vivinta socian vivon k. la laboristaro estas ne jam organizita en siaj sindikatoj. Tial la movado estis ampleksa sed supraĵa, brila sed erara k. la eraro kreis malfortigon de la movado.

A. Levandovsky, S.-A.-T.-ano 1335. 6.1.24

*Sennacieca Revuo* n° 10 (51) Julio 1924, pp. 7-8.

[11] Ne aperis en *Анархисты Документы*. Vidu noton n° 1.